2-a Jaro, N-o 20 (72) APERAS S.A.T. SEMAJNE 11. Februaro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Sidejo de la Redakci-Komisiono: Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz (Germ.) | Sidejo de Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Sirio

La ribelo en Sirio estas finiĝanta. La tereno ĉirkaŭ Palestino estas ree okupata de francoj. Veturadas delegacioj: la damaska delegacio, la delegacio de libanaj druzoj, oni intertraktas. Kaj estiĝas demando — kiaj estas la rezultoj? Estas eble, ke la druzoj mem ricevos ian kompenson, ke la sultanon El-Atraŝ oni devos peti pardonon. Sed kion gajnis Sirio, la siria laboristaro, la internacia laboristaro? La franca regado super Sirio restas kiel antaŭe, la imperialismo estas netuŝata en siaj pozicioj.

La sola reala rezulto de la ribelo estas — la duma solvo de la Mosula Konflikto favore al Anglio. La siria ribelo ne kaŭzis plifortiĝon de la laborista klaso nek en Sirio, nek ie alie — sed ĝi donacis la kurdojn al la reĝo Fajrul kaj al lia angla mandatanto, kaj jen ĉio. Ne vane veturis la nova siria gubernatoro de Parizo al Bajrut . . . tra Londono. Sed la siria ribelo estis *demokrata* movado. Ĝi ne konsistas el la feŭduloj, efendaj de la palestina "araba ekzekutivo". Ĉi-tie kristan-musulmanaj spekulantoj, popol-malamikoj, naciistoj, sed tie libera monta gento kun ne ĝisvolvita malforta klas-diferenciĝo unuflanke, kaj la etburĝa siria nacia partio kun la metiistaro, butikistaro kaj demokrata inteligentularo duaflanke. Ĉi-tie malamo al la laborista klaso, al ĉiu provo de ekonomia progreso en la lando; tie malamo al la konkiranto, al la diktaturo de la fremda forta regno, kaj tamen — tia rezulto! Kaj tamen tiu-ĉi tuta movado estis ludilo en la batalo de unu imperialismo kontraŭ la alia.

Ne havante sub si mastruman bazon por serioza provo al liberiĝo, estis la siria etburĝaro devigata dum la ribelo ascendi vojojn aventurplenajn kaj provi unuflanke sin apogi sur la dezirojn de la montgentoj, kiujn ĝi ja tute ne povis eĉ influi, kaj sur la fremdajn kapitalistajn fortojn, duaflanke, kiuj ĝin bone eluzis por siaj celoj, por siaj imperialistaj interesoj.

La mallumaj reakciuloj eluzas la sirian ribelon por pliakrigi ĉe ni la nacian malamon, la ŝovinistan agitaĉon — afero severe kontraŭbatalenda. La ribelo estas ankaŭ eluzata por plifratigi la militistan spiriton kaj tiele malrimarkigi la laboristojn de siaj klasaj celoj kaj taskoj. La laboristaro devos lerni de la ribelo, ke ĝi devas gardestari je siaj pozicioj por rebati kaj nuligi imperialistajn apetitojn de la kapitalistaro, ĉar nur organizo de la laborista klaso povas krei baron por vera revolucia movado.

El judlingva "Arbeter Welt" organo de la Palestina lab. partio "Poalej-Cijon":

Jak (227).

El Italio

Mussolini ĉiam diras, kune kun la faŝgazetoj, kiuj superegas en Italio, ke la tuta itala popolo sammaniere pensas, opinias, kiel li, sed la vero estas tute honta, ĉar la proletariaro ne nur, sed eĉ ĉiagrada kontraŭ faŝistoj eĉ ne povas paroli. Spionoj kuŝas ĉiuflanke kaj ĉie. Se vere la plimulto itala estas kun li, *kial* li bezonas uzi perfortaĵojn, leĝojn eksterordinarajn malpermesojn pri gazetoj, ĉu ili estas proletaraj aŭ eĉ neproletaraj sed nur kontraŭfaŝistaj, ktp.?

Pri la anglaj faŝistoj mi legis, ke ili perfortis per revolveroj ŝarĝoaŭtomobilon, kiu enhavis proletarajn gazetojn. — Eble la polico ne trovos aŭ plej bone ne "serĉos" la perfortantojn, kaj ili, kuraĝigitaj, vidante ke la perfortantoj ne estis ĝenitaj, pligrandiĝos ktp.

Mi aldonas, ke la faŝistgazetaro eĉ postulegas malaperigon pri la kontraŭfaŝisma konstitucia patria gazetaro. Certe post tiu malapero la faŝgvidantaro proklamos "39 milionoj da italanoj faŝistiĝis"!!!

Pripensu, ke jam delonge eĉ tiuj gazetoj sin detenas presi kaj publikigi proprajn opiniojn pri faŝismo, por eviti konfiskojn.

Sed al tiuj gazetoj estas bone ĉiaspeca reakcio, ĉar ili, kiam faŝismo ekkomencis agi, subtenis la faŝmovadon.

Ĉiujn gazetojn, inkluzive la proletarajn, oni aĉetas grandnombre, kontraŭe la faŝgazetaro eĉ ne estas aĉetataj de la multaj faŝmembroj kartigitaj, pro tio ke inter ĉilastaj ekzistas treege da metiistoj, oficistoj ktp. (precipe ŝtataj) kiujn la faŝistoj devigis pagi kotizon por faŝ-partio, aŭ faŝsindikato, alie ili restus senlaboruloj.

Transskribo de, en la urbo, grandkvante mursurgluitan afiŝon:

Brener'a garda **dekordono**

(Dekordono al gardistoj de Brennero)

1. Itala dieco.
2. La pratempaj Rom-anoj superis ĉiujn terglobajn loĝantojn.
3. La Brenero ne estas alvena punkto sed deira punkto.
4. La plej malfama (aŭ malklera) italano valoras ne malpli ol mil eksterlandanoj.
5. La italaj produktaĵoj estas la plej bonaj el tiuj tuteksterlande produktitaj.
6. La italaj pejzaĝoj estas la plej belaj el ĉiuj, kiuj kuŝas sur la terglobo.
7. Por taksi belecon de itala pejzaĝo necesas italaj okuloj, t. e., geniaj okuloj.
8. Italio posedas ĉiajn rajtojn, ĉar ĝi entenas, kaj entenos la absolutan monopolon de la kregenio. (Kreiganta genio).
9. Ĉiaj kaj ĉiuj elpensaĵoj estis elpensitaj de italanoj.
10. Tial, ĉiu fremdulo devas eniri Italion religie.

Subskribis: *F. E. Marinetti*

La 3. punkto ne klarigas bone la aferon, sed kunligante la 4. kaj 8. punktojn ŝajnus, ke la italanoj havas rajton superregi . . . ĉiujn mondenloĝantojn!!!

J. F.

Kamero malhela

La komitato por eksteraj aferoj de l' germana parlamento traktis la demandon pri aliĝo al la ligo de nacioj. Pri la kunsido nepublika ekzistas jena *oficiala raporto,* kiun ni parte redonos.

La kunsidon ĉeestis la tuta ministraro. Tuj komence kom. deputito proponis publikecan pritrakton, kiun la plejmulto neis.

Poste regna ministro de ekstero prezentis sian pozicion rilate la aliĝon al la ligo de nacioj. Post la ministro parolis la diversaj deputitoj.

En la voĉdonado estis akceptita jena propono 18 por, 8 kontraŭ.

"Post la klarigoj de l' sinjoro regna ministro la komitato por ekstero konsentas, ke la regna registaro eluzas la rajtigon per la leĝo de 28. nov. 1925 por eniri en la ligon de nacioj. Tiu ĉi propono superas ĉiujn ĝis nun prezentitajn proponojn, kiuj malkonsentas la eniron en la ligon de nacioj, aŭ kiuj ligas al kondiĉoj, pro tio la komitato transiru al la tagordo."

Per akcepto de supra propono du aliaj proponoj, unu, kiu kondiĉas la aliĝon, kaj alia, kiu tute malaprobas la aliĝon, estas nuligitaj.

Lau tiu raporto la propono pro efektivigo de publikeco estis malaprobita. Do, la sinjoroj preferis "kameron malhelan" por decidi la eniron en la ligon de la nacioj.

Germanrespublika justeco

En majo 1919, post kiam renversiĝis la regado proleta en Bavario (Germanio), la soldataro de la regna armeo germana "restarigis la ordon" verŝigante fluegojn da sango. Multege da proletoj "falis en kruda batal'" kaj longtempe post tiu tempo oni mortkondamnis la plej kuraĝajn batalantojn. Ekz. Eŭgen Leviné estis mortpafita la 6. junio 1919.

Iam en marto 1919 la tiama regna ministro por defendo Noske ordonis, ke ĉiu, kiu batalis perarmile kontraŭ la regna armeo kaj en kies hejmo oni trovis armilojn, tuj estu mortpafataj. Sed tiu ordono nur devis esti aplikita ĉe tiuj, kiuj estis trovitaj batalantaj.

Kaj tamen la naciaj oficiraĉoj senĝene murdis proletojn senkulpajn. La soldataĉaro furiozis kontraŭ ĉio kio odoris laŭ laboristo. Unu tia kazo ekscitigas momente tutan laboristaron germanan.

Komence de majo 1919, enmarŝinte en Perlach (loko, proksime de Munĥeno) la regnaj armeanoj kaptis dumnokte 12 laboristojn el la sama loko. Ili trenis la proletojn en la korton de la "munĥena bierfarejo" kaj tie ĉiuj 12 estis mortpafitaj! Sen iu procedo, sen iu juĝo!

La ĉefkrimulo, leŭtenanto Pelzing kiu ordonis ĉi-fiagojn nun antaŭ mallonga tempo staris antaŭ la bariloj de la germanrespublika justeco.

Ĉeestante kiel atestanto Noske mem deklaris, ke tute ne montriĝis necese mortpafi sen io ajn la laboristojn.

Plue la prokuroro eĉ en sia finparolado diris: "La mortpafitoj ne estis ruĝgvardistoj. Do, ne ekzistis kaŭzo mortpafi ilin. Dum la enmarŝo de la regna armeo en Perlach nenia batalo ekbruliĝis. La laboristoj kondutis sin tute trankvile. Fakto estas, ke la mortpafitaj laboristoj estis tute senkulpaj.

Kaj tamen la kulpuloj liberiĝis, juĝite de juĝistaro, kiu ĉiam pretendas esti senpartie "objektiva"!

Ilia objektiveco direktiĝas nur kontraŭ samklasanoj kaj tiel agante ili mem pravigas nian batalon. Fine estu menciite, ke momente en Boĥum (Rejnlando) funkcias proceso kontraŭ laboristo, k-do Margies. Li praktike defendis siajn aŭ pli bone niajn idealojn, batalanto kontraŭ la "separatistoj"[1]. Endanĝerigite li pafis al policistoj kaj nun la burĝaro penas, ankaŭ lin elmondigi.

Sed la proletaro germana kaj certe ankaŭ tiu de la tuta mondo subtenas tiun klasbatalanton sciante, ke la burĝa juĝistaro ne ĉie kaj ne ĉiam "objektive" juĝas. Pri k-do Margies estas ankoraŭ raportota.

Sao 3414.

Pola registaro nutras la senlaborulojn per grenadoj

Daŭrantaj kelkajn tagojn en Zaviercie apud Sosnoviec senlaborulaj demonstracioj fariĝis pli kaj pli minacaj. La 17. dec. 1925 la senlaboruloj amasiĝis apud la magistrata domo. Por savi la sieĝitan urbestron rapidiĝis la taĉmento de piediranta kaj surĉevala policistaro. Ili penadis dispeli la amason per ĉevalatako kaj per apliko de tranĉarmilo. Tamen la amaso ne foriris. Tiam oni aplikis la unuan fojon en Polio la de mallonge enkondukitajn ĉe policservo gasgrenadojn, eksplodantajn kun granda krako kaj kaŭzantajn la larmiĝon. Etaj taĉmentoj de policistoj provizitaj per gasmaskoj alĵetis en la amason kelkdekojn da grenadoj. La demonstraciantoj, opiniantaj ke tiuj estas batalgrenadoj, ĵetis sin surteren. Tuta placo apud la magistrata domo estis kovrita de kelkmiloj da homoj. La larmigantaj kaj mordantaj gasoj komencis sian efikadon. Traigita per teruro, la amaso forkuradis en diversajn direktojn kaj la maskitaj policistpatroloj puŝadis la malrapidemulojn. Vespere disvastiĝis la trankvilo.

Tiamaniere la burĝa registaro nutras la malsatulojn elpelitajn surstraten de ekstrema mizero. La burĝaro tremanta antaŭ la kolero de popolo ne elserĉas la rimedojn. Krom la grenadoj oni provizis ĵus la policistaron je novaj kaskoj gardendaj kontraŭ la ŝtonĵetoj. Tamen baldaŭ ne estos helpantaj la grenadoj kaj kaskoj — ne estos helpantaj eĉ la maŝinkarabenoj kaj la kanonoj. La okazoj iras je pli kaj pli rapida paŝo.

Katilina.

[1] La separatista movado celas malligon de Rejnlando de la cetera Germanio por fondi aŭtonomian respublikon de Rejnlando.

La verk.

Antikva tempo en Belgrad

En ĉiuj pli grandaj lokoj denove okazis domserĉadoj kaj arestoj, el la policarestejoj reeĥas la krioj de la batitoj kaj turmentitoj.

De la 24.—26. jan. devis okazi la kongreso de la sendependaj sindikatoj en Belgrad. Pri tio oni parolis en ĉiuj laboristaj rondoj kaj skribis en la laboristaj organoj. Ĝi ne estis sekreto al la publiko.

Sed kiam proksimiĝis la tago de la kongresmalfermo,[1] la belgrada policistaro eklaboris. Dum kelkaj tagoj ĝi sole en Belgrad domserĉis en centkvindek laboristaj loĝejoj. Ĝi arestis la membrojn de la plenumkomitato starigita de l' sendependaj sindikatoj kaj pli ol 250 konatajn revoluciulojn.

Plue la belgrada policistaro ree uzis la rimedojn kaj metodojn de la antikva inkvizicio, kiujn ĝi precipe aplikis ĉe la esploroj. Per kruelaj batoj kaj turmentoj policistaro nun laboras. Pri tio mem raportas la jugoslava *burĝa* gazetaro.

El Greklando

Fine de jan. komenciĝis ĉe la militjuĝejo en Athen la proceso kontraŭ la E. K. de K. P. de Grekio kaj kontraŭ multaj partoprenintoj de la 3. partitago de la KPG. okazinta en dec. 1924. Krom la proceso kontraŭ la "32" oni volas kondamni ankoraŭ sep k-dojn, inter ili la *sekretario de la Ĝenerala Sindikata Asocio,* la tipografiston *Evangelos.* Dekunu k-doj jam depost ok monatoj estas en la karcero. Ĉiuj akuzitoj, inter ili la membroj de la C. K. de K. P., Maksimos, Poliopolos, Sklavos, Kantas k. a., estas akuzitaj pro "landperfido", pro "perfido de la greka distrikto Macedonio al Bulgario". La akuzskribaĵo nomas tiun partitagon "konspirkonferencon". *Al ĉiuj akuzitoj minacas la mortpuno.*

Terorondo super Jugoslavio

La jugoslava registaro dum la lastaj semajnoj trovis necesa, timigi la publikan opinion per ruĝa fantomo. Tiucele oni subite eltrovis revolucian "konspiron", arestis centojn da proletoj, plenigis la paĝojn de la gazetoj kun detalaĵoj pri la konspiro, sendis mensogajn telegramojn eksterlanden, kaj la policistaro plej aktive eklaboris por savi la en "danĝeriĝintan" patrion. Laboristpersekutoj, simile al tiuj, kiuj antaŭ jaroj subpremis la laborularon de la lando. Ĉiuj gvidantoj de la laboristaro en karcero, ĉiuj proletaj organizaĵoj disigitaj. La Paŝitĉ-registaro montras, ke ĝi tute ne fariĝis pli demokrata ol la antaŭaj registaroj.

La balota potenco de la revolucia socialistaro dependas de plena industria organizo de la laboristaro produktiva.

Daniel de Leon.

SENLABORECO

Kuriozaĵoj el burĝa mastrumo en Polio

I.

1. La ŝtataj arbaroj enspezas tiel malmulte, ke ili enspezus pli, se ili estus senpage disdonitaj kaj ŝarĝitaj de norma imposto.

2. La ministraro de kamparaj reformoj destinita al parceligado de bienoj al la kamparanoj kaj ekzistanta de kelkaj jaroj sen parceligo de unu hektaro kostas tiom, ke oni povus forigi ĝin kaj por ĝiaj elspezoj aĉeti ĉiujare *100 000* hektarojn kaj disdoni senpage al la kamparanoj.

3. La detirado de kelkaj impostoj (enspezimposto ĉe la ŝtatoficistoj) kostas dufoje pli ol la impostoj mem.

II.

En konservativa ĵurnalo Ĉas (La tempo) skribas grafo J. Tiŝkieviĉ: "En interna ŝtata politiko oni renkontas ĉiupaŝe regulojn kaj leĝojn kverelantajn inter si, kio malfaciligas kaj eĉ rekte malebligas al la oficoj la norman laboradon." "La financa ministraro aligis el si la tiel sensencan financplanon, ke hodiaŭ tuta lando ĝemas pro pezo de mizero." "Oni komencas redukti, sed oni reduktas la plej malaltajn oficistojn, kiuj multfoje estas plej bezonindaj kaj plej laboremaj, kaj oni restigas sur siaj postenoj diversajn prezidantojn, direktorojn, sekretariojn ktp., kiuj vere nenion faras kaj prenas kolosajn salajrojn." "Oni retenas diplomatiajn postenojn en la plej etaj ŝtatoj sur tuta terglobo, kun kiuj Polio neniam havas iujn rilatojn kaj al la gravaj ambasadorejoj oni detranĉas la plej necesajn monprovizojn."

III.

Prezidanto de burĝkamparana partio "Liberigo" deputito J. Dombski skribas en sia organo "Gazeta Ludova" (Popola Gazeto): oni devas malpliigi la buĝeton ĝis la duono, redukti la duonon da oficistoj, ekstermi la malbonuzojn kaj ŝtelaĵojn, kies sumoj aliras al centoj da milionoj jare (tuta jara buĝeto elportas 1800 milionojn), devigi la oficistojn, ke ili hommaniere agas kun la loĝantaro.

IV.

Laŭ la ŝtata raporto elportis en Polio en tempo de la 11. ĝis la 17. decembro 1925 la nombro de senlaboruloj *286 693*; la alkresko rilate al antaŭiranta semajno *12 128*.

En la tempo de la 18. ĝis la 24 dec. 1925 — 302 253 — alkresko 15 560. Do la nombro de senlaboruloj transpaŝis nune la duonon de tuta industria laboristaro en Polio. La resto laboras plejparte 2—3 tagojn semajne.

Katilina.

Kiu mizeriĝas?

Admiralitato en Portsmut koncernante propagandon (politikan) inter maristaro faris ordonon, en kiu estas skribite, ke aŭtoroj de proklamaĵoj celas perfortan, revolucian detronigon de la registaro kaj formi laboristan registaron, kiu en Rusio venigis al mizero. *(El gazetaro)*

Pri tio, kiu mizeriĝas — ĉu Sovetio aŭ burĝaj landoj — oni povas paroli nur apogante sin sur firma fundamento t. e. ciferoj. Tiajn ciferojn ni povas preni el buĝetoj.

Enspezoj laŭ buĝeto SSSR

Enspezoj	Cara[1]) buĝeto 1913	Jaro 1924/25	+ pli − malpli
	%	%	%
Impostoj	49,3	44,2	— 5,1
Regnentrepenoj kaj regnhavaĵoj	44,6	47,4	+ 2,8
Eksterordinaraj . .	0,4	8,4	+ 8
Ceteraj	5,7	—	— 5,7

Kiam ni konsideras la buĝeton de SSSR komparante ĝin kun buĝeto cara 1913, ni konstatas — ke malgraŭ ĉiuj baroj, kiujn faras por laborista lando burĝaj registaroj — bonajn rezultojn. Unue ni konstatas, ke impostaj enspezoj, havantaj en cara buĝeto 49,3% en la soveta malpligrandiĝis je 5,1%. Krom tio necesas rimarki ke rektaj impostoj en soveta buĝeto ludas pli grandan rolon ol la malrektaj. Due ni konstatas en soveta buĝeto pligrandiĝon de neimpostaj enspezoj.

Kia grupo de loĝantaro kiom pagas impostojn montras jena tabelo:

Nomo de kategorioj	Kiom proc. da impostoj pagas
Laboristoj	8
Oficistoj, liberaj profesioj ktp.	22
Nelaborulaj grupoj .	70

[1]) Sen enspezoj de vinproduktado.

Nun pri buĝetoj de burĝaj landoj: Germanio, Anglio kaj Usono.

Enspezoj laŭ buĝetoj en proc.

Enspezoj	Germanio			Anglio			Usono		
	1913	1923/24	+ pli − malpli	1913	1923/24	+ pli − malpli	1913	1923/24	+ pli − malpli
Impostoj	48,8	98	+ 49,2	95,3	93,3	− 2	94,1	84,4	− 9,7
Profito de regnentreprenoj	16,6	2	− 14,6	3,8	0,5	− 3,3	0,6	—	− 0,6
Proc. de monkapitalo	6	—	− 6	0,9	1,6	+ 0,7	—	6,1	+ 6,1
Ceteraj enspezoj	28,6	—	− 28,6	—	4,6	+ 4,6	5,3	9,5	+ 4,2

Kiam ni faras analizon de la buĝetoj ni konstatas, ke en venkita lando Germanio impostoj pli ol duobliĝis kaj samtempe profito de regnentreprenoj malpligrandiĝis okoble.

En buĝetoj de venkintaj landoj ni konstatas malgrandan malpligrandiĝon de impostaj enspezoj kaj samtempe pligrandiĝon proc. de monkapitalo. Sekve kiam oni pripensos la buĝetojn de venkintaj landoj estos pravaj se oni diros ke proc. de impostaj enspezoj en la buĝetoj preskaŭ ne malpligrandiĝis; nur pagas ilin popolo de venkita lando en aspekto proc. de monkapitalo. Oni ne povas diri, ke registaroj de la landoj ŝanĝigis sian rabistan politikon, ĉar faktoj parolas, ke ili krom sia popolo ankoraŭ komencis rabi aliajn popolojn.

Ĝenerale ni povas konstati, ke buĝetoj de la landoj estas buĝetoj impostaj, kiuj premas pli multe la laboristojn, kvankam registaro de la landoj ne estas laboristaj kaj ŝajnus, ke laboristoj ne devus subteni ilin.

Malon ni observas en la soveta buĝeto. Impostaj enspezoj en ĝi havas malpli ol duonon, samtempe kiel enspezoj de regnentreprenoj kaj regnhavaĵoj havas preskaŭ duonon de la buĝeto. Ĉio dirita sufiĉe montras al ni, ke mizeriĝas ne lando kie laboristoj forpelinte burĝaron formis sian registaron, sed burĝaj landoj, kiuj ne deziras vidi mizeriĝon de l' popolo sialanda.

Tio estas karakteriza trajto de ĉiuj burĝaj registaroj. *B. Dzetoveckij* (Astrakan)

La frukto maturiĝas

La krizo fariĝas pli kaj pli akra — de nenie savo. Hodiaŭ jam ne tagoj sed horoj alportas novaĵojn. La urboj estas surverŝitaj de senlaboraj amasoj. Sur la stratoj oni renkontas dekojn kaj centojn da figuroj mizerege vestitaj, tramalvarmigitaj, malsategaj. Ili serĉas laboron kaj petas almozon. Sur iliaj vizaĝoj malespero, furiozo. Sur ĉefplacoj ili amasiĝas — sed la policistaro plinombrigita disigas ilin. Tamen la nombro de senlaboruloj kreskas pli kaj pli rapide. La burĝaro ektimas. Ĝi ne povas kuraĝiĝi por ia afero por ĝia regno, sed ĝi kuraĝiĝas por la unueca fronto kontraŭ la malsatuloj. La burĝa gazetaro silentas pri minacinda stato. Pri gravaj akcidentoj oni sciiĝas buŝraporte, kiel je antikvaj tempoj. En Krakovo, Varsavio, Lodz ktp. sangaj demonstracioj — vunditoj, kadavroj — bomboj. La registraro enpaŝas, aplikas malesperigajn rimedojn. Improvizado specialajn laborojn. Filantropia agado grandskale.

Kaj la proletaj partioj? Pola partio socialdem. estas en reganta plimulteco — ĝiaj reprezentantoj sidas en ministra kabineto. Por la proletaro ĝi havas la vortojn pri patrujo kaj trankvilo. Ke ĝi ne miru perdante la reston de konfido ĉe la amasoj, ke tiujn ĉi amasojn alkondukos iu alia en batalon.

Katalina 35.

La faŝista leĝodonado

La faŝistoj en Italio aldonis novan floron al la glorkrono de siaj krimoj.

En Italio troviĝas ĉ. 100 000 (cent mil) senlaboruloj. Nun faŝistaj fak-organizaĵoj ediktis ukazon, kiu malpermesas la senlaborecon. Ĝis nune, tiuj ĉi senlaboruloj "ĝuis" subtenon de la ŝtato; certe multe pli granda estis la nombro de ti-kiuj ricevis nenion kaj ne plu estis enkalkulataj en tiun centmilon. Depost nun, ĉiu, kiu ne povos disponi dokumenton pri tio, ke li laboras, estos arestita kaj kondamnita. (Mi estus sciavida, kiel la faŝistoj kondutos kontraŭ la "senlaboraj", t. e. mallaboremegaj burĝoj, nobeloj kaj riĉuloj, pasigantaj vintrojn kaj somerojn en Venezia, Riviera kaj aliaj "marbanoj"). Tiamaniere, la faŝistoj proklamas, ke la tuta "patrio" estos ŝanĝata je unu granda laborejo, kie neniu restos nelabora kaj plenumos sian rolon.

Aresti la senlaborulojn kaj enkarcerigi ilin — ankaŭ metodo. Kaj tre facila. Sama metodo kiel tiu ĉina, priskribita en "La pluvo", Senn. n-o 67, pĝ. 7. Se la infano timas ion, ĝi fermas la okulojn, por ne vidi tion; la struto en sama okazo ŝovas kapon en sablon. Verŝajne sinjoro Mussolini timas la senlaborulojn; tial li enfermas ilin, por ne vidi ilin. "Ili ne estas videblaj, do ili ne ekzistas".

Cirkle turniĝas la rado, kaj juĝistoj finaj estos ni! *Erinazzo.*

La batalkampo de la laboro

Ĉiu 20. homo estas viktimo de la profitemaj kapitalistoj. Laŭ statistiko pri akcidentoj okazintaj en la karbdistrikto Waldenburg (Germanio).

Ĉe laboristaro, kiu nombras 30 000 okazis 8000 akcidentoj, dum la laborprocedo, 1490 inter ili finis per mortiĝo. Tiu terura statistiko donas ekzemplon, kiel senskrupule oni ludas per la vivo de laboristo, por kiom eble plej altigi la profiton. *Voko.*

Novaj iloj por la klasbatalo

Antaŭ kelkaj semajnoj la laboristoj holandaj de vaportramo de l'linio Zutfen-Emmerik postulis plialtigon de salajro. La direktoro transsendis ĉi-peton al la landa ligo de tram- kaj fervojistaj direktoroj. Antaŭ ol la direktoro ricevis respondon de sia ligo, li proklamis al la tramistoj persone (do ekster la laborista ligo), ke: "se iu laboristo ekstrikos, li estos maldungata, kaj ankaŭ la laboristoj ne akiros la postulojn." Samtempe kelkaj tramistoj, de alia linio, estis devigataj labori kiel strikrompantoj; unu laboristo rifuzis tion, — tuj li estis maldungata. Do nun la direktoro nur volis ellogi la strikon. Nun la laboristsango ekbolis. Kion faris la tramistoj tiam? La tram- kaj fervojista ligo aĉetis 5 grandajn aŭtomobilojn pro tio, se la tramistoj ekstrikos, tuj ili povas ekspluati la aŭtomobilojn apud la malfunkcionta tramo. La tram- kaj fervojista ligo estas laŭorde la dua plej riĉa profligo en Holando, pro tio, ke laŭ ŝtata leĝo estas al fervojistoj malpermesata striki (ti-kiu propagandas fervojistan strikon tuj estos malliberigata). Kaj depost la 1903a jaro ili ankaŭ ne plu strikis, do la monkaso estas sufiĉe forta (ĉar ili ne plu post tiu jaro subtenis strikon), por aĉeti kaj ekspluati ĉi-batalilojn, kaj tiamaniere ili povas sufiĉe longtempe striki. Ĉi tramistoj havas treege malaltan salajron, longajn labortagojn, kaj ne havas homindan ekzistadon. Se ili venkos la strikon, tio estas venko por la tuta tram- kaj fervojistaro. *Ho-Ho (5612).*

≡ FEMINISMO ≡

Virino en Perslando

(Fino)

Sed bienposedantoj, ĥanoj, komercistoj, aristokratoj havas edzinojn eĉ pli ol permesas al musulmanoj korano. Kaj ĉimalegaleco la popolon ne indignas, ĉar estas dirita en "libro sankta", en korano, ke nur tiu havas rajton preni kelkajn edzinojn, kiu povas doni al ili egalajn vivrimedojn . . .

Dum fino de estinta centjaro Persion abunde komencis alflui eksterlanda kapitalo kaj de fino de estinta jarcento sub eksterlanda skurĝo en manoj de observisto laboras persinoj sur rizaj kaj teaj plantaĵoj, en silka kaj tapiŝa industrio. En ĉi-plantaĵoj kaj industrioj persinoj laboras po 10—12 horojn dum tagnokto pro 1 Kran'o (20 rusaj kopekoj).

Neniuj organizaĵoj, neniu defendo de regna flanko estas ĉe persinoj . . . Feliĉe por eksterlandaj kapitalistoj inter dunglaboristinoj kaj metiistinoj neniam okazis ekonomiaj aŭ politikaj strikoj kaj ribeloj. Ekpenetro de eksterlanda kapitalo Persion alportas al laborista klaso nur jugon kaj neniam kulturon. Sed al virina medio (de posedanta klaso) ĝi alportis ian kulturon. Sub influo de tio ankoraŭ dum 1901—1902 jaroj progresemuloj penis krei en urbo Tavriz unuan virinan lernejon. Ĝi estas atakata kaj la registaro ĝin fermis. Sed dum lasta dekjaro virinaj lernejoj finfine firmiĝis kaj komencis aperi en diversaj urboj. Nuntempe Persio havas 100—120 virinajn lernejojn, en kiuj tamen filaboras amerikaj misiistoj.

Kiam dum unua persa revolucio rusa cara registaro ekpostulis enkondukon de rusaj kozakaj taĉmentoj en nordan Persion, kelkaj centoj da virinoj (inteligentaj) eniris parlamentejon kun revolveroj sub ĉadroj. Ili malkovris ĉadrojn kaj postulis, ke registaro defendu la landon de rusa invado, minacante komenci batalon kun kozakoj. Tiu estis unua fakto, kiam persinoj partoprenis en politika, socia vivo de la lando. Dum ĉi-tempo de unua persa revolucio en Persio ekzistis sekretaj virinaj kluboj.

Kaj nur je jaro 1919, kiam tondroj de la proleta oktobro ekaŭdiĝis en Persio, persinoj unue ekpostulis leĝon pri forigo de ĉadroj, enmaniginte al la registaro petskribon. Sed certe ĉi petskribon persaj regantoj metis sub tablan drapon.

En provincoj Giljan guberniestro-feministo kelkajn monatojn antaŭ nun permesis al virinoj vizitadi teatrojn, ĝardenojn, bulvardojn ktp. Alian tagon post ĉi-guberniestra permeso ĉiujn teatrojn, ĝardenojn kaj bulvardojn plenigis ĝoje ekscititaj persinoj. Sed pastraro komencis furiozan fiatakon kontraŭ la guberniestro kaj la lasta estis devigata ŝanĝi sian permeson. Malgraŭ tio la registaro forigis lin de la posteno.

Nuntempe virina movado iras en Persio pro forigo de ĉadroj, klerigado de virinoj kaj plimalgrandigo de edzaj rajtoj ĉe viroj. Persoj-viroj havas tre vastajn edzajn rajtojn. En Persio ekzistas prova geedziĝo (sige) kaj prove viro povas edziĝi nelimigitan kvanton da fojoj, malgraŭ tio, ke li havas konstantajn edzinojn. Geedziĝo sige povas daŭri laŭ konsento kun gepatroj de fianĉino 1 tagon, 1 monaton, 1 jaron aŭ vesperon pro difinita rekompenco al gepatroj de fianĉino. Tial multaj gepatroj vendas sian filinon centfoje dum mallonga tempo kaj fakte iliaj filinoj fariĝas prostitulinoj, senrajtaj vendeblaj sklavinoj.

En Tejran estas eldonata virina ĵurnalo kaj en tiu ĵurnalo virina movado de Persio havas tutan sian rebrilon. Kelkaj liberemaj organoj ankaŭ presigas artikolojn, subtenantaj virinan movadon. Sed en sia plimulto perslanda publika opinio ankoraŭ estas tre malproksima por egaligi rajton de la persino kun tiuj de la viro . . .

En persa kom-organizaĵo inter anoj de la partio estas persaj virinoj. 90 % el ili estas instruistinoj, kiuj devenas el malaltrangaj oficistaj familioj, dunglaboristinoj kaj metiistinoj. Persaj komunistinoj diference de feministinoj havas taskon penetri industrion, kie laboras virinoj, kaj efektivigi inter ili propagandon.

Persajn laborulinojn tre interesas stato de musulmana virino en Sovet-Unio. Ĉiu sciigo pri konkiro de rajto kaj laboro por plibonigo de vivo de laborulinoj en soveta oriento incitas persinojn je batalo por rajtoj de l' homo.

Dum somero de ĵus finiĝinta jaro dagestanaj montaninoj sendis donace al persaj laboristinoj standardon.

El "Turkmena Fajreto" trad. *J. Bojev*, Poltorack.

Usono

Benjamin Gitlow, kom. gvidanto, estis liberigata el malliberejo pro postulo de okazintaj du kunvenegoj.

La Internacia Unuiĝo de Vestaĵ-Gelaboristoj por sinjorinoj kaj la Int. Unuiĝo de Pelt-Gelaboristoj apelaciis lian liberigon unuanime.

La ambaŭ suprenomitaj unuiĝoj voĉdonis por monda profunuiĝ-kunigo. *G. S.*

EDUKADO

La kongreso de la "Angla Weachers Labour League" decidas aliĝi al Eduk-Intern per 291 kontraŭ 211 voĉoj

La lernejoj devas ne produkti salajrsklavojn. Instrulaboristoj volas prezenti la mondon tiel, kiel ĝi estas.

"La instruistoj estas ĉiuj stultuloj. Aliel la gelaboristoj kiuj sidadis sub ili ne daŭre subtenadus politikajn partiojn, kiuj kontraŭstaras iliajn interesojn."

Ĉi-tiu rimarko farita de socialistino, estas citita de s-ro H. J. Redgrove, la nove elektita prezidanto de la labor-ligo de geinstruistoj, en sia prezidanta alparolado, ĉe la 4. ĉiujara konferenco okazinta hieraŭ en Londono.

"Mi ne konsentas la opinion de la sinjorino", s-ro Redgrove plu diris sed, samtempe, mi kredas, ke ĝi enhavas iom da vero. Miaopinie io certe estas malbona je nia eduksistemo por liveri la rezultaton, kiun ŝi bedaŭris. Eble la instruisto iom kulpiĝas, sed mi asertas, ke estas la subpremanta sistemo kiu bezonas aliigon."

Aludinte la sintenadon de tiuj, kiuj opinias, ke la politiko kaj la edukado devas esti apartigataj, s-ro Redgrove rimarkigis, ke estas fundamenta diferenco inter socialista teorio kaj la teorioj de la pli malnovaj politikaj partioj. La socialismo baziĝas sur ekonomiaj faktoj.

"La fakto, ke estas klasbatalo en kiu ni ĉiuj enmiksiĝas vole-nevole", diris s-ro Redgrove, estas tiel nekontraŭdirebla fakto, kiel la Normana Konkiro kaj ĝi estas fakto multe pli interesa kaj multe pli lernenda.

"Laboristo kiu ne estas socialisto estas strangulo — kaj certe ne klerulo. Ili malsukcesis fari bonajn socialistojn, ĉar ili malsukcesis prezenti la bildon de la hodiaŭa mondo, kiel ĝi vere estas, kaj ne sukcesis prezenti tion, kiel la socialaj kaj ekonomiaj kondiĉoj evoluiĝis ĝis la hodiaŭa bedaŭrindega stato."

La lernejo devus ne degeneri en fabrikejon por elverŝi salajrsklavojn. Liaopinie la klerigado devus havi duoblan celon. Ĝi devus plifaciligi ĉiun vojon al la feliĉo kaj al la ĝuado por la infano kaj prepari la infanon por ke ĝi estu utila en la komunumo.

Urĝa rezolucio kontraŭ la ago de la registaro rilate al la proponoj skizitaj en la cirkulero 1371 estis unuanime aprobata. Ĝi protestis kontraŭ la malhelpoj al edukada progreso per la limigo de subvencio ĝis la sumo pagita en 1924—1925, kaj speciale kontraŭ la malbonega propono pagigi sumon de 30 ŝilingoj por ĉiu infano malpli ol kvinjaraĝa, kies nomo troviĝas en registrolibro lerneja.

La rezolucio ankaŭ esprimis kontraŭstaron je la malpliigo de poredukada elspezado.

S-ro Goye, parlamentano, prezidinto de la NUT (Nacia unuiĝo de geinstruistoj) diris, ke kvankam oni enmetis la cirkuleron en ŝrankon ĝi ne estas nuligita. Lordo Eustace Percy ankoraŭ ridetadas. Li celas akiri per administrado tion, kion li volis atingi per leĝfarado.

Ŝparemo ne estis ĉesigita. La registaro ne intencis, ke ĝi ĉesu. Antaŭmeditita plano al la unuagradaj lernejoj nun estas efektivigita de la Board of Education (Konsilantaro por Edukado, registara fako). La ministro (Lordo Eustace Percy) neniel subtenas la rajtojn de la infanoj de la laboristklaso. Li havas grandan memestimon kaj li scias pli pri socia reakcio ol pri edukado. (Konsentaj ekkrioj.)

Post debato, kiu daŭris 2 horojn, kun kelkaj viglaj periodoj, oni aprobis aliĝon al Education al Workers' International (Eduklaborista Internacio) kartbalote per 291 voĉoj kontraŭ 211. Estiĝis granda entuziasmo poste inter plimulto, kaj oni kantis la "Internacion".

Per ŝanĝo de la statutoj de la ligo, aprobita kartbalote per 371 kontraŭ 123, la ligo deklaris, ke ĝi staras flanko ĉe flanko kun la aliaj laboristoj en la lukto por anstataŭigi la kapitalisman ŝtaton por socialisma komunumo. (Commonwealth angle).

M. Vernochet, sek. de la Eduklab. Internacio estis bonvenigita kiel frata delegito.

Alparoladante la konferencon, li diris, ke en Francio oni atentis kun granda intereso la sintenadon de ĉi-tiu lando rilate al cirkulero 1371. Li subtenis la vortojn de s-ro Goldstone, sekr. de la NUT. Ja vere la infanoj devas ne suferi por ke profituloj pliriĉiĝu.

"Ĉi-tiu cirkulero", diris M. Vernochet, "ne estas sole nacia afero. Ĝi estas internacia. Atako kontraŭ edukado en unu lando reefikas en alia. En Anglio krizo evoluiĝas. Estas necese, ke la instruistaro frontu ĝin". Konsilante internacian solidarecon li aldonis: "Vera klerigado venos nur post la renverso de la kapitalisma sistemo."

La konferenco per plimulto akceptis, kiel sian politikon rilate al la administrado de edukado, planon kiu starigos Nacian Edukadan Konsilantaron kiel plej aŭtoritataron por gvidadi la direkton de la nacia edukado kaj por kontroli naciskale junulan laboradon ĝis 18. jaraĝo; la konsilantaro konsistanta egalnombre el parlamentaj deputitoj, edukadaj lokaj aŭtoritatoj, kaj instruistoj.

La plano pledis, ke regiona kontrolado estu per loka edukada aŭtoritato, kun anaro konsistanta el egalnombro de ties elektitoj (anoj) kaj de la lokaj instruistoj, kaj kun sendependa prezidanto; ankaŭ ke estu lerneja kontrolkomitato el instruistoj, gepatroj kaj anoj de la loka edukada komitato (aŭtoritato) egalproporcie; ĉi-tiu komitato estu rajtigita elekti la instruistaron por iu lernejo, kun kondiĉo, ke la loka aŭtoritato kontrolu la lernejon kaj prizorgu postlernejan bonstaton.

Per granda plimulto oni konsentis je plano por disvastigi socialismon inter britaj geinstruistoj kaj por celi la starigon de unueca Instrulaborista Profunuiĝo.

Informoj de la pedagogia esperantista servo. El "Daily Herald", 30. 12. 25, Londono.

Tradukis *H. Stay, SAT-ano 2978*

DIVERSAĴOJ

Labortravivaĵoj kaj libertempo

Ĉi linioj devas servi por akcenti la necesegon de pli vigla korespondado inter la SAT-anoj por la bono de la proletaro tutmonda. Pri kio ni ĉefe diskutu por interesigi niajn laborkunulojn? Ekzistas multaj demandoj, kiuj gravas por la psika-fizika senstreĉiĝo dum libertempo post penplena ekspluato de moderna salajrsklavo; kiel: uzin-pedagogio, higieno, labortempo-daŭro, la efikoj de salajr- kaj impostpolitikoj al la laborkapablo kaj -emo, ĉu laŭvola aŭ deviga profesio, ĉu organizata aŭ ne, ĉu metilerninta aŭ alkutimiĝinta laboristo, ĉu laboranta en uzino laŭ vira aŭ virina laboro, poste pri la laborproduktado mem, iu period-mekanika ktp. Per tio ni konstatu, ĉu ekzistas anima interligiĝo ĉe laboristo rilate al laboro kaj libertempo. — La sorto de la industria laboristo estas fortigata per socia, historia kaj uzinteknika mankoj kaj postulas senesperigan rifuzon de psika-fizika naturo. Ĝi estas la socia ofero, kiu ebligas unue kaj definitive kulturkapablon. Socia ofero pro tio, ĉar nia industrilaboristaro estas limigita okupi sin pri kulturo nur dum la mallonga libertempo. Kiom longe regos la ekonomia fiburĝaro, restos vana idealismo la klopodo por enkonduko de kulturĝuo en uzinojn. Kiu havas la feliĉon vivi en modernaj t. e. sindikate kaj partie organizitaj laboristfamilioj, povos konsenti, kiel ĝojige kaj penplene estas klopodanta por la nur iomete ebla partopreno kultura, antaŭ ĉio kiel anima ribelo kontraŭ la disciplinigita laborservo. — La "kulturo de libertempo" fariĝis la plej malfacila problemo pro la grandaj vastiĝo kaj kompliko de la ekonomia vivo, per kiu la restarigo de korpa kaj anima ekvilibroj estas konsiderataj nur tro malmulte aŭ tute ne. — Konsideri oni ankaŭ devas la familian vivon, por ke la homo ne fariĝu maŝinparto. La laborĝojo kaj konduto de laboristo estas influataj; ĉu li devas zorgi por multaj nelaborkapablaj familianoj, ĉu la loĝejo estas aranĝita laŭ higiena kaj kultura vidpunktoj aŭ ne, ĉu oni devas labori dumtage aŭ dumnokte, plena aŭ plimallongigita labortempo, ĉu malsanoj aŭ nerva trostreĉiĝo pro troega okupo pri laboristmovado ktp.

Kiamaniere laboristo provas venki la mankon de kulturo?

Klaskonsciulo vizitas la sindikatajn kaj partiajn kunvenojn, legas laboristan ĉiutagan gazeton, ekonomiajn kaj sciencajn verkojn, aniĝas al unuiĝoj, en kies ejoj li trovas samcelanojn por interŝanĝi la ideojn. Tiuj, kiuj havas longan vojon al la ekspluatejo (kiel precipe en Germanio, kie oni bezonas multfoje unu fervojan horon por atingi la laborejon) estas serĉantaj kunulojn, kun kiuj oni sin komprenas. Per tiu ago oni ne nur volas pasigi pli agrable la enuigan veturadon

en plenplenaj, malbonodoraj prus- spartane aranĝitaj vagonoj kvaraklasaj, sed oni volas ĉerpi novan forton, inciton por la kultura laboro libertempa.

Fakto estas, ke klaskonsciulo en fabriko estas ĉirkaŭata de laborkunuloj, ĉar li ĉiam scias la plej aktualaĵojn, kiu por ĉiu havas entuziasmigan konsilon, proponon. Ĉiu atendas la tagmanĝan horon sin demandanta: "Pri kiu la k-do parolos hodiaŭ?"

Nun, kamaradoj, meditu pri ĉi citaĵo, ĉu en via rondo ne okazas la samo? Nepre necesas uzi nian korespondadon por klerigi la kunulojn. Ankaŭ ni devas scii la spertojn faritajn rilate al la enlaboreja edukado; kiu pli efikas ol publika kunveno.

Hermann Scherbaum.

SCIENCA KRONIKO

Kojnon oni elbatas per kojno

En mez-aziaj respublikoj, kie estas disvastiĝintaj malario kaj sifiliso, nun oni kuracas sifilison per infekto de malario (tritaga raso) al malsanuloj. Rezultatoj estas bonegaj.

Komunikis S. Bojev Poltorack

Natura Pliiĝo

Estas nenia escepto en la leĝo, ke ĉiu organika vivaĵo nature pliiĝas tiom rapide, ke, se ĝi ne estus detruita, la tero baldaŭ estus kovrita de la naskitoj de nur unu paro. Eĉ malrapide-reproduktanta homo duobliĝas en 25 jaroj, kaj en kelkaj jarmilo estus efektive nenia starloko por iliaj posteuloj. Linnes kalkulis, ke se jara planto produktas nur 2 semojn kaj estas nenia planto tiom malfekunda kiom tia — kaj iliaj semidoj sekvantan jaron produktus du, ktp. post 20 jaroj estus milionoj da plantoj. La elefantojn oni konsideras la plej malrapidan reproduktanton el ĉiuj konataj bestoj. Kaj mi tre klopodis por kalkuli ĝian kapablon minimuman de natura pliiĝo: Estas plej certe supozi, ke ĝi komencas bredi je 30. jaro, kaj daŭras bredi ĝis 90. jaro naskigante 3 parojn da idoj en tiu periodo. Se estas tiel, je la fino de la kvina jarcento, estus 15 milionoj da elefantoj, devenintaj (posteuloj) de la unua paro. Sed ni havas pli bonan ateston pri tiu temo ol nurajn teoriajn kalkulojn, nome, la multajn registritajn okazojn de la suprize rapida pliiĝo de diversaj animaloj en natura stato, kiam cirkonstanco favoris ilin dum 2 aŭ 3 sinsekvaj sezonoj. Eĉ pli frapanta estas la atesto de niaj dom-bestoj diversaj, kiuj resovaĝiĝis en kelkaj mondpartoj. Se la diroj pri la grado de pliiĝo de malrapide bredantaj brutoj kaj ĉevaloj en Sud-Ameriko, kaj poste en Aŭstralio, ne estis bone aŭtentikaj, ili estus nekredeblaj.

Tiel estas ĉe plantoj; okazojn oni povus citi pri enkondukitaj plantoj, kiuj komuniĝis tra tutaj insuloj en periodo de malpli ol 10 jaroj.

El Origino de Specoj de Darvin. *J. F.*

Restaĵoj de Helena kulturo en Krimeo

Arkeologaj organizaĵoj, speciale de orientscia de CIK (Centra Ekzekutiva Komitato) en la daŭro de estontaj jaroj decidis fari vicon da sistemaj elfosoj en Krimeo, prezentantaj grandan intereson por esplorado de monumentoj de Skita kaj Helena periodoj. La komenco de ĉi-tiuj laboroj estis farita per profesoro K. E. Grineviĉ, apud la urbo Kerĉ, per elfosaĵoj de fama Ora Altaĵo. Laŭ opinio de profesoro Grineviĉ Altaĵo kaj grandega remparo de Kerĉa duoninsulo de Ora Altaĵo ĝis Azova maro prezentas reston de militaj konstruaĵoj de Greka-Roma tempoj (3—1 jarcentoj de nia ero) por defendo de la Helena-Bospora regado kontraŭ sovaĝaj loĝantoj de Krimeaj stepoj. Videble, la Ora Altaĵo estis ne nur tomba monumento, sed ankaŭ la konstruaĵo de strategia karaktero. La altaĵo estis ĉirkaŭita de muro, en kies fundamento kuŝas grandegaj ŝtonpecegoj. Laŭ opinio de esploristoj la komenca aperado de la Altaĵo rilatas eĉ la 5. aŭ 4. jarcento antaŭ kristo. Apud la remparo estas malkovrita antikva urbego en kiu estis trovita multo da restaĵoj de la antikva kulturo, pecoj de amforoj, argilaj bareletoj por vino ktp. Sur unu turno de la remparo estas trovitaj restaĵoj de malgranda fortikaĵo.

Elrusigis Belajev

Sennacieca Asocio Tutmonda

Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XXe
Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835

OFICIALA INFORMILO

Celo: *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

Ekzekutiva Komisiono

De nun, oni adresu ĉion, kio koncernas E. K. kaj D. K. al
K-do Glodeau, 23 rue Boyer, Paris XX,
la poŝtmandatojn, ĉekojn ktp. oni tekstu ankaŭ je tiu nomo kaj adreso.

Al niaj membroj

Granda parto de niaj membroj ne jam renovigis la membrecon. Ĉar ni en plej proksima tempo kompilos la jarlibron por 1926 estas necese, ke la k-doj faru tion kiel eble plej baldaŭ. Samtempe oni ankaŭ bonvolu atentigi tiujn membrojn, kiuj ne estas legantoj de "Senn." Ni nur publikigos la adresojn en la jarlibro de tiuj k-doj, kiuj pagis la ĉi-jaran kotizon.

Ne laciĝu en la varbado de novaj membroj, ĉu aktivaj, ĉu pasivaj. Notu bone, ke la jarlibro estas la spegulo de via aktiveco. Tre vigle laboris ĝis nun niaj k-doj en Sovetio, Holando, Anglio, Lyon, Marseille. Ankaŭ en Wien kaj Linz kelkaj k-doj bone varbis por SAT. En Dresden estas nia k-dino Boxhammer, kiu konkuras en la varbado.

Same ni atentigas la SAT-grupojn kaj -rondojn sciigi la kunvenon: dato, horo, loko ĝis 10. 3. 26 por ke ĝi povu aperi en la jarlibro kiel lastjare.

Adm.

Municio por SAT k. ĝiaj organoj

de 20. nov. 1925 ĝis 31. jan. 1926

Argentino: J. Miliĉiĉ J. — Juncal 3,74 mk.g.; **Aŭstrio:** Krstuloviĉ — Wien, 1 ŝil; 4628 — 1 ŝil.; **Bulgario:** 4958 — 60 lev.; 4099 — 100 lev.; **Ĉekoslovakio:** Lustinetz — Wilsdorf, 5 kr. ĉek.; **Danio:** 116 — 2,40 mk.g.; **Finnlando:** Suomi — Helsinki, 10 mk. fin.; **Francio:** Delalande — Bourges, 10 fr. fr.; 1771 — 2 fr. fr.; 1889 — 2 fr. fr.; 926 — 2 fr. fr.; 552 — 2 fr. fr.; 5887 — 4 fr. fr.; 1151 — 2 fr. fr.; 659 — 2 fr. fr.; Kristafor — Versailles 7 fr. fr.; 4614 — 2 fr. fr.; **Germanio:** 921 — 3 mk.; 4151 — 0,50 mk.; 1204 — 0,50 mk.; 1810 — 1,05 mk.; 1803 — 0,50 mk.; 1806 — 0,75 mk.: 1225 — 4,50 mk.; 762 — 1,10 mk.; Müller — Glösa, 0,50 mk.; Gültling — Hamburg, 1,40 mk.; 2959 — 1 mk.; G. T. — 1,50; 4028 — 0,50 mk; 3862 — 2,— mk.; 3762 — 1,50 mk.; Conrad — Auerbach, 0,50 mk.; Halter — Gültling, 10 fr. belg.; **Hispanio:** 2461 — 1,88 mk.g.; **Italio:** 1890 — 5 lir.; **Litovio:** Ŝipelis, 1 mk. g.; **Usono:** 1090 — 0,80 dol.; 3647 — 0,90 dol.; 1801 — 0,30 dol.; 4820 — 0,30 dol.; 1781 — 4,90 mk. g.

Blinduloj!

Cele al kreo de tia SAT-fako, ni scivolas la nomojn de ĉiuj SAT-blinduloj. — Informojn sendu al nia Administrejo: Colmstr. 1 III, Leipzig-Stötteritz.

Alvoko

Kamaradoj tutmondaj!

En Vladivostok esp.-mov. progresas precipe inter inteligentularo kaj jen por havi praktikan bazon por propagandi Esp-on inter gelaboristaro, montri al ili utilecon de la lingvo, *interligiĝu* kun ni per helpo de korespondado. Vi povas skribi pri profesi-mov., komjunul-, kom.- jun.-pionir.-movadoj, pri vivo de laboristoj, pri laboro ktp. Multaj temoj do estas interesaj por laboristaro. Skribu laŭ adreso: *Sovetio, Vladivostok,* Poŝt-kesto 56. Al k-do Verŝinin A. I. (SAT. 4638). Mi garantias respondojn je nomo de mia sindikato (prof.-unio) de laboristoj de nutraj-industrio.

Verŝinin

KORESPONDEJO

5201 — Je l' nomo de tri solestarantaj bonvolu informi nin pri la nomoj de l' rusaj gek-doj ne respondintaj al vi.

2056 — Via manuskripto aperas sub "Felietono".

52 — Tiu afero jam ekzistas — "Proletara esp. presservo".

5733 — Ni respondos al vi skribe.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG